


# THE ESPERANTO MONTHLY

A  
MAGAZINE  
FOR  
TEACHERS  
AND  
STUDENTS  
OF THE  
INTERNATIONAL  
LANGUAGE



*All the world  
at your elbow*

## BE PREPARED

(SCOUT NUMBER)

ESPERANTO will help SCOUTS  
to BE PREPARED for friendship  
with SCOUTS the world over

### Every Scout should Join the Scouts' Esperanto League

Published by  
THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (INC)  
17, HART STREET, LONDON, W.C.1.



# ESPERANTO AT A GLANCE

ESPERANTO IS  
PHONETIC.

All letters  
sounded :  
one letter  
one sound.

ACCENT or STRESS  
falls on the second  
last syllable.

NO IRREGULARITIES.  
NO EXCEPTIONS.

## THE ALPHABET OF ESPERANTO

A a	B b	C c	Ĉ ĉ	D d	E e	F f	G g
ah	bo	tso	cho	do	eh	fo	go
Ĝ ĝ	H h	Ĥ ĥ	I i	J j	Ĵ ĵ		
Joe	ho	hho	ee	yo	zho		
K k	L l	M m	N n	O o	P p	R r	S s
ko	lo	mo	no	oh	po	ro	so
Ŝ ŝ	T t	U u	Ŭ ŭ	V v	Z z		
sho	toe	oo	woe	vo	zo		

No Q, W, X, or Y.

A, E, I, O, U  
have approximately  
the sounds as in  
*bar, bear, bier, bore, boor.*

C is not sounded like  
S or K, but like  
*ts* in *Tsar*.

J has the sound of  
*y* in *yes*.

The sounds of ĉ, ĝ, ĥ,  
ĵ, ŝ, and ŭ are heard in  
*leech, liege, loch, leisure,*  
*leash, and leeway.*

THE GRAMMAR is based upon SIXTEEN FUNDAMENTAL RULES.  
THE PARTS OF SPEECH are formed from Root-Words by the addition of appropriate Letters.

**O**

is the ending of the NOUN:

fakto	gluo
telefono	fajro
piano	tasko

ADJECTIVES end in

evidenta	freŝa
longa	furioza
granda	simpla

**A**

NOUNS and ADJECTIVES form the PLURAL by adding  
evidentaj faktoj      longaj telefonoj      grandaj pianoj

**J**

*aj, oj* sound as  
in *my boy*

THE SIMPLE VERB HAS ONLY SIX INFLECTIONS.

INFINITIVE.

PRESENT.

PAST.

FUTURE.

CONDITIONAL.

IMPERATIVE.

**I**

**AS**

**IS**

**OS**

**US**

**U**

ESTI  
LERNI  
INSTRUI

estas  
lernas  
instruas

estis  
lernis  
instruis

estos  
lernos  
instruos

estus  
lernus  
instruus

estu  
lernu  
instruu

**N**

marks the ACCUSATIVE (*direct object*)

Mi (*I*) instruas lin (*him*)  
Li (*he*) instruas min (*me*)  
Ŝi lernas Esperanton

ADVERBS end in

rapide  
entuziasme  
diligente

**E**

## ESTU PRETA: LERNU ESPERANTON

PARTICIPLES used as ADJECTIVES, NOUNS, and ADVERBS:

ACTIVE—Present -ANT'

Past -INT'

Future -ONT'

PASSIVE—Present -AT'

Past -IT'

Future -OT'

Mi estas instruanta.

Mi estas la instruanto.

Instruante, mi lernas.

Vi estas instruata.

Vi estas la instruato.

Instruate, vi lernas.

**ĈU**

pr. *chew*.  
ASKS  
QUESTIONS.

piano  
harpo  
fluto  
violono  
orgeno  
trumpeto

estas  
INSTRU-  
MENTO

rozo  
tulipo  
lilio  
geranio  
violo  
narciso

estas  
FLORO

banano  
tomato  
melono  
olivo  
orango  
figo

estas  
FRUKTO

elefanto  
gorilo  
ĝirafo  
kato  
hundo  
kamel

estas  
BESTO

Let your YES be

**JES**

and your NO be

**NE**

**LA**

tasko  
piano

}  
estas  
(*is*)

simpla  
granda

THE PREFIX

malsimpla  
malgranda

KOLOROJ.

(The)

fiŝo  
anekdoto

}  
estis  
(*was*)

freŝa  
longa

**MAL**

malfreŝa  
mallonga

blanka papero

ruĝa inko

blua krajono

bruna ĉokolado

rozaj lipoj

progreso  
raporto

}  
estos  
(*will be*)

rapida  
favora

DENOTES  
OPPOSITES.

malrapida  
malfavora

NUMERALS—UNU, 1; du, 2; tri, 3; kvar, 4; kvin, 5; ses, sep, ok, naŭ, dek; cent, 100; mil, 1000; miliono. ORDINALS: unua klaso, dua klaso, tria klaso.

PROFESSIONS

shown by  
suffix

**IST**

dentisto      ĵurnalistoj  
farmaciisto      botistoj

FEMININES

shown by  
suffix

**IN**

patro      patrino  
reĝo      reĝino  
leono      leonino

An ESPERANTO KEY, containing Grammar, Vocabulary, and Exercises,  
will be sent on receipt of a penny stamp by THE BRITISH ESPERANTO  
ASSOCIATION (Incorp.), 17 Hart Street, London, W.C.1



# The Scouts' Esperanto League

BY ITS PROVISIONAL PRESIDENT,  
SUBTRUPESTRO "AVOTO."

My old friend the bicycle and I have been in many parts of England and Wales together, and no matter where we go, we can almost always see one of those jolly little groups of bell-tents somewhere between us and the horizon; whereupon we say to each other, "Brother-scouts!"

Then we strike the trail, and sure thing, nine times out of ten we find a laughing band of little brothers, ever ready with a warm welcome for a brother-scout.

Once, before the War, we (the bike and I) had a pleasant little tour in France, and there we saw the same honourable uniform, and met with the same brotherly welcome, and came away thinking soberly but with a quiet joy of the great ball of goodwill which the Chief (may his shadow never grow less!) has set rolling round the world.

But these delightful experiences in France set us thinking in another direction, too. We had never had much visible evidence of the goodwill of these French brothers until we got amongst them and had exchanged the familiar salute and handshake. We should probably not have got on so well with them even then, but for the fact that I happened to be able to speak their language. Of course, the spirit of friendship would have been there just the same, but *think* of us sitting round their camp fires making signs and funny noises at each other, instead of, as we did, exchanging useful ideas and interesting yarns and exciting adventures!

Suppose we (still the good old bike and I) had been journeying in Greece or Poland or Japan, we should no doubt have found just

as many brother-scouts, who would certainly have been equally eager to welcome and befriend us in true scout style, but how far should we have got without a language?

There are many languages spoken in Scoutland (which you can call Skoltujo in Esperanto), and most of them are fairly difficult to learn. That is why our foreign brothers are still a mystery to most of us, even though they have the same laws, signs, salutes, uniform, and (best of all) the scout spirit.

Now you who read this paper scarcely require telling that this is where Esperanto comes in. Esperanto is exactly the simple code language which we scouts badly need in order to make friends *completely* with our brothers abroad.

Wherefore, rather more than a year ago, in a dug-out not far from the firing-line in France (just outside a village called Ransart, S.S.W. of Arras, to be precise), I wrote a booklet in Esperanto, entitled "Propono pri Skolta Esperantista Ligo" (Suggestions for a Scouts' Esperanto League), which you can still obtain from our secretary<sup>1</sup> for fourpence post free.

We have done a great deal since then, and already the Scouts' Esperanto League is represented in many different countries. We are aiming at making this new combination movement a great force in knitting together the scouts and scout organisations all over the world.

Between you and me, however, we must have many more members and heaps more money before we

<sup>1</sup> Provisional Hon. Sec. and Treas. of S.E.L.; Rotestro K. GRAHAM THOMSON, 40 Oaklands Road, Bexleyheath, Kent, England!



shall be justified in asking for official recognition from the various national scout headquarters, or in publishing our very own international scout gazette and books, or even in running interpreters' centres at the various international rallies and jamborees which will probably be held everywhere during the coming years.

Therefore we hope that every scout who reads this (assuming that he has already some knowledge of Esperanto) will write to our secretary for full particulars, join the League, and persuade all the scouts he knows to do likewise.

Go ahead, the Interpreters!

AVOTO.

\* \* \*

Ni sciigis kun plezuro, ke oni intencas instrui Esperanton al knaboj en *Grantown Road School*, Liverpool, laŭ afabla permeso de la Direktoro de Edukado. Ĉi tio estas frukto de la Brita Kongreso en Liverpool.

## Kiel Skoltoj povas Helpi la Ligon de Nacioj.

Estas la devo de ĉiu skolto amikiĝi kun fratskoltoj en ĉiuj landoj. Se li ne povas viziti ilin li povas korespondi kun ili. Li povas sin turni al la Ĉefskoltejo por ricevi la nomon de alilanda skolto kiu volas korespondi. Sed se li ne posedas Esperanton li devos korespondi en la nacia lingvo aŭ en la lingvo de sia korespondanto, kio povas esti tre malfacila por li. Kredeble liaj penoj skribi en alia lingvo multe ridigos lian korespondanton. Kiom pli bone se ili korespondu en Esperanto, kiu estas tiel facile lernebla. Ĉiuj skoltoj devas lerni Esperanton ĉar ĝi efikas por interkomprenigadi la junulojn de la mondo, kiuj estas la civitanoj de la morgaŭo kaj tiamaniere ili povas labori por la sukceso de la Ligo de Nacioj, kiu devas esti ne nur Ligo de ĉiuj nacioj sed Ligo de ĉiuj anoj de ĉiuj nacioj.

W. H. DRUMMOND PAGE,  
*Provizora Agento de la S.E.L.,  
por Skotlando.*

## Some Facts

about the

### Scouts' Esperanto League.

(Other papers please copy.)

SEL was founded in October 1918.

\* \* \*

The declared objects of SEL are:—

- (1) To spread the scout ideals by means of Esperanto;
- (2) To spread Esperanto among scouts of every country;
- (3) To create a scout literature in Esperanto;
- (4) To publish an international scout gazette or review; and
- (5) To strengthen the feeling of brotherhood, common to both movements, among the youth of all nations.

\* \* \*

The motto of SEL is: "LIFE to the Fourth Law!"

## Kelkaj Faktoj

pri la

### Skolta Esperantista Ligo.

(Aliaj gazetoj volu represi.)

SEL fondiĝis en oktobro, 1918.

\* \* \*

La anoncitaj celoj de SEL estas:—

- (1) Disvastigi la skoltajn idealojn per Esperanto;
- (2) Disvastigi Esperanton inter skoltoj ĉiulandaj;
- (3) Krei skoltan literaturon en Esperanto;
- (4) Eldoni internacian skoltan gazeton aŭ revuon; kaj
- (5) Solidarigi la senton de frateco, komunan ĉe la du movadoj, inter diversnaciaj junuloj.

\* \* \*

La devizo de SEL estas: "VIVIGU la Kvaran Leĝon!"



The present headquarters of SEL is 40 *Oaklands Road, Bexleyheath, Kent, England*, and the provisional hon. sec. and treasurer is Leader K. Graham Thomson, to whom all enquiries should be addressed from England or from any country not hereinafter specified.

\* \* \*

The Agents of SEL are at present the following :—

SKOTLANDO.—Subrotestro W. H. DRUMMOND PAGE, 218 Bruntsfield Place, Edinburgh.

KIMRUJO.—Subtrupestro GRAHAME C. GIBSON, 12 John Street, Llanelly.

FRANCUJO.—Ĉefregionestro HENRI MEYER, 2 rue Villeneuve, La Rochelle.

SVISUJO.—Subtrupestro ALFRED EGG, Poŝtfako 17621, Baden, Argovio.

POLUJO.—Leŭtenanto W. HUZA, 1 P.S.P. Gosp. Oficerska, Nowy Sacz.

USONO.—Ĉefregionestro JOHN H. FAZEL, 100 East Sixth Street, Topeka, Kansaso.

SUDAFRIKO.—Ĉeftrupestro C. C. MAWBEY, ĉe Standard Banko, P.O. Box 1031, Johanburgo, Transvaalo.

All communications from those interested who live in these countries should be addressed to the National Agent.

\* \* \*

Membership of SEL is open to all scouts, scout officers, old scouts, rovers, wolf clubs, girl guides, brownies and sea scouts. Any other persons, however, who sympathise with our aims may join as Associates.

\* \* \*

There is no entrance fee at present, as we are relying on the practical generosity of all who are interested to maintain our funds.

\* \* \*

Besides the countries above-named, we are in touch with brother-scouts in Ireland, Denmark, Sweden, Norway, Finnland, Czechoslovakia, Esthonia, Russia, Siberia, Italy, Spain, India, Australia, Tasmania, Canada, Gold Coast, and other countries.

\* \* \*

Finally, we want at least 200 new members before the end of the year. *A wink is as good as a nod to a blind horse!*

La nuna ĉefsidejo de SEL estas 40 *Oaklands Road, Bexleyheath, Kento, Anglujo*, kaj la provizora hon. sek. kaj kasisto estas Rotestro K. Graham Thomson, al kiu oni devus sendi ĉiujn informpetojn el Anglujo aŭ el iu cetera lando ne ĉi poste nomota.

\* \* \*

La Agentoj de SEL estas nune la jenaj :—

Ĉiujn komunikaĵojn la interesitoj loĝantaj en ĉi tiuj landoj volu sendi al sia Nacia Agento.

\* \* \*

Povas membriĝi en SEL ĉiuj skoltoj, ĉefoj, eksskoltoj, lupoj, lupidoj, skoltinoj, koboldinoj kaj marskoltoj. Tamen aliaj personoj, kiuj simpatias je niaj celoj, povas fariĝi Asociatoj.

\* \* \*

Estas nune nenia enirpago, ĉar ni fidas je la malavareco de ĉiuj interesatoj porsubteninian kapitalon.

\* \* \*

Krom la suprenomitaj landoj, ni interrilatas kun skoltaj fratoj en Irlando, Danujo, Svedujo, Norvegujo, Finnlando, Ĉeĥoslovakujo, Estonujo, Rusujo, Siberio, Italujo, Hispanujo, Hindujo, Aŭstralio, Tasmanio, Kanado, Ora Marbordo, kaj aliaj landoj.

\* \* \*

Fine, ni deziras almenaŭ 200 novajn anojn antaŭ la jarfino. *Palpebrumoj al blindaj ĉevaloj kaj kap-skuoj estas egaloj!*

AVOTO.



## Skoltismo en Francujo.

En Francujo, la Skolta Movado formiĝis tre malrapide.

En la jaro 1911 naskiĝis kelkaj asocioj, el kiuj la du plej gravaj estas *Les Eclaireurs Unionistes* (Unuiĝaj Skoltoj) kaj *Les Eclaireurs de France*.

*Les Eclaireurs Unionistes* estis la unuaj. Organizitaj de la *Unions Chretiennes de Jeunes Gens* (Y.M.C.A.), ili sin apogas sur fundamento decide religia, kaj tial restas plene sendependaj.

En Junio 1911 okazis la unua ĝenerala kunveno de Skoltoj; 4 trupoj estis reprezentataj. La ran de Novembro 1913, en jara kunveno en Meudon, 800 skoltoj ĉeestis.

La pasintan jaron, venkinte la malhelpaĵojn kaŭzitajn de la milito (preskaŭ ĉiuj trupestroj estis ja mobilizitaj; cento da ili mortis ĉe la honorkampo), la movado progresadis kaj la vivpovo de la *Eclaireurs Unionistes* pli kaj pli montriĝas.

En la nuna jaro, triobla klopodo (financa, morala, religia) estas farata por havigi al la Asocio pli plenan disvolviĝon. La 9, 10 kaj 11 de Novembro, okazos (kredeble en Reims) nacia kunveno de la Ĉefoj, en kiu la Skoltismo certigos sian decidon, kun pli da fido ol iam havigi al la morgaŭa Francujo fortan kaj puran junularon.

La oficiala gazeto de la E.U. estas *L'Eclaireur Unioniste* (abonprezo tri frankoj). La sidejo de la nacia komisaro estas en Parizo, 46 rue de Provence.

La *Eclaireurs de France* samtempe faras paralelan laboron. La du asocioj estas kunigitaj en federacio, por interkonsente prosperigi la Skoltismon en Francujo.

De Ĉefregionestro HENRI MEYER,  
Prov. Agento en Francujo de Skolta  
Esperantista Ligo.

## Skoltismo en Svisujo.

Post kiam en la jaro 1908 fondiĝis en Anglujo la unuaj skoltaj grupoj, imitadis tion baldaŭ la francoj, k.t.p., kaj starigis samajn organizojn. Sed daŭris ankoraŭ sufiĉe longa tempo, ĝis kiam la movado atingis Svisujon. Kelkaj personoj, komprenante la anglajn skoltajn laborrimedojn, decidiĝis enkonduki la movadon ankaŭ en Svisujon. Kelkaj provoj okazis jam antaŭe, sed la antaŭpuŝo grava por la afero okazis nur en februaro 1912. La junaj grupoj de la "Kristanaj Societoj por Junaj Viroj" (Y.M.C.A.) alprenis la movadon en sia programo. Kiel ne alie atendota, la movado trovis en tiuj ligoj entuziasmigataj anoj. Baldaŭ stariĝis de la "Kristanaj Societoj por Junaj Viroj" sendependaj skoltaj grupoj.

Por kunligi la ekzistantajn grupojn fondiĝis centra komitato, kies sidejo estis en Genevo.

La poste kunmetita skolta leĝo konsistis el la skolta promeso kaj el la leĝo originala. La leĝo havas 12 leĝerojn, sed la enhavo tute respondas al la internacia skolta leĝo.

La standardo de la svisaj skoltoj estas tiu de la lando, nome: blanka kruco en ruĝa kampo. Ĉiu grupo havas sian flagon triangulan. Ĝi elektas la kolorojn de la flago mem. La devizo estas: Allzeit bereit (Ĉiam Preta). La insigno estas: streĉita arbalesto sur flamita fundo, meze kun la svisa kruco. Ĉirkaŭ la rando estas legebla la devizo. La saluto kaj la uniformo tute respondas al la internaciaj. Ekzistas tamen grupoj, kiuj ne plu portas la skoltan stangon.

Ĝis Januaro 1919 estas en Svisujo, 3465 skoltoj el kiuj 201 trupestroj.

Skoltismo ankaŭ en la malgranda Svislando kreskas kaj progresas.

De Subtrupestro ALFRED EGG,  
Badena Trupo,  
Prov. Agento en Svisujo de Skolta  
Esperantista Ligo.



## Esperantista Skolto.

Skolto Heatherby, ano de la Buldoga Roto de la 2a Hoverton Trupo, estis skolto entuziasma, kaj krom tio li estis esperantisto.

Li aŭdis amikino de la patrino paroli pri Esperanto, la Internacia Lingvo, kaj tuj li ekinteresiĝis, petante ke ŝi instru lin, por ke li povu skribi al knabskoltoj en ĉiuj landoj de la mondo. La fraŭlino, domaĝe, ne havis sufiĉe da tempo por instrui lin, sed ŝi donis libron al li, dirante al li, ke la lingvo estas tre facile lernebla, kaj ĉar li estas skolto, li rapide povas instrui sin mem. Samtempe ŝi konsentis korekti liajn ekzercojn, kaj helpi lin kiel eble plej multe.

Post tre mallonga tempo li ricevis poŝtkartojn kaj leterojn el ĉiuj partoj de la mondo, kaj li komencis konstati, kia utila akiro estas la scio pri Esperanto, ĉar nun li povas esti "frato de ĉiu alia skolto." Antaŭe li nur konis skoltojn en sia propra lando, sed nun li havas "fratojn" en ĉiu civilizita lando de la mondo.

Forpasis du jaroj de kiam Ĝako komencis lerni Esperanton. Nun li estas flua parolanto. Lastan jaron li vivis eksterdome kun kelkaj el siaj esperantistaj fratoj en Francujo.

Ĉi tiun jaron li invitis du skoltojn el Holando, unu el Italujo, unu el Rusujo, kaj ankoraŭ alian el Svedujo, al la Somera Tendaro de sia trupo, kaj ili pasigis "la tempon de siaj vivoj" (angla diraĵo por "ĝuegita sperto").

La ceteraj knaboj de la trupo, kiuj antaŭe ridis je li, kredante ke li, lernante "neutilan" lingvon, forfuŝas sian tempon, tiel surpriziĝis, kiam ili aŭdis Ĝakon paroli esperante kun siaj alilandaj fratoj kvazaŭ li konis ilin dum la tuta vivo, ke nun ĉiu el ili komencis lerni. Plue, en la sekvanta jaro ili intencas starigi mirigan Internacian Tendaron.

## An Esperantist Scout.

Scout Heatherby, of the Mastiff Patrol, 2nd Hoverton Troop, was an enthusiastic scout, and besides that he was an Esperantist.

He had heard a friend of his mother speaking about Esperanto, the International Language, and he became interested at once, asking her to teach him, so that he could write to boy scouts in all the countries of the world. Unfortunately the lady had not enough time to teach him herself, but she gave him a book, telling him that the language was very easy to learn, and that, being a scout, he could quickly teach himself. At the same time she agreed to correct his exercise books and to help him as much as possible.

In a very short time he was receiving postcards and letters from all parts of the world, and he began to realise what a useful acquirement the knowledge of Esperanto was, for now he was able to be "a brother to EVERY other scout." Before, he only knew scouts in his own country, but now he had "brothers" in every civilised country in the world.

Two years have passed since Jack began learning Esperanto. Now he is a fluent speaker. Last year he camped out with several of his Esperantist brothers in France.

This year he invited two scouts from Holland, one from Italy, one from Russia, and yet another from Sweden to come to the Summer Camp of his troop, and they had the time of their lives.

The other boys in his troop, who had formerly laughed at him for learning a "useless" language, were so surprised when they heard Jack speaking Esperanto with his foreign brothers as if he had known them all his life, that now they have all begun to learn. Further, next year they intend having "some" International Camp.

De J. W. LESLIE,  
Rotestro, 8ia Nordlondona Trupo.



## La Murmurantaj Pinoj.

*Kial vi sopiras, vi pinoj moviĝemaj,  
Kriantaj tra la nokto, tra la longaj  
pacaĵ horoj?*

*Kial vi plendadas per voĉoj tiel ĝemaj,  
Kaj rompas la silenton pro sovaĝaj  
la humoroj?*

*Kion ventoj flustras rapide vin  
pasante,*

*Veninte el la landoj trans la ŝaŭm-  
kovrita ondo?*

*Kial vi sibladas, ĉu estas ĉar konstante  
Vi sentas en la koro la spiriton de  
l' respondo?*

*Ĉu vi ŝatas aŭdi la mevojn kaj la  
kriojn,*

*Dum ili tuŝas kise la vizaĝon  
oceanan?*

*Ŝajne vi komprenas la marajn sim-  
foniojn,*

*La timegindan povon, furiozan kaj  
titanan!*

*Ĉu vi moke ridas je uragana forto,*

*Je la migrantaj voĉoj el la mal-  
proksimaj lokoj?*

*Eble je rakontoj pri l' vivo kaj pri  
l' morto*

*Pri ŝipoj kiuj krakas sur la sen-  
indulgaj rokoj.*

*Kial vi sopiras, vi pinoj, kaj disŝiras  
Komplete ĉiun horon kaj pliigas  
mian ĝenon?*

*Kial en la lito mi miras, vane miras,  
Multfoje demandante la silentan  
kapkusenon?*

BERTRAM POTTS.

\* \* \*

Every representative at the Conference of Labour at Washington this month will have put into his hands the text of the Covenant of the League of Nations and of the League of Labour, in Esperanto, with the parallel official versions in French and English. In the preface it is pointed out that there are discrepancies between the official texts, an argument in itself for a

neutral language for international documents. The Esperanto is compiled from both texts by Mm. Daniel Eyquem, Barrister of the Appeal Court, Paris, and Grosjean Maupin, aggregate Professor of the University of Paris, and Mr W. M. Page, Solicitor Supreme Courts, Edinburgh.

\* \* \*

*The Future* (not the Government publication, but the organ of the English Language Union) has turned its back on Esperanto with the following editorial pronouncement:—

It is useless to advocate the adoption of an artificial language. It is simply a mournful waste of energy. Every artificial language yet constructed has been rapidly followed by others claiming to be infinitely superior. Esperanto has been boomed with the utmost vigour and at lavish expense of time, energy, and hard cash. It has been followed by ten others in as many years, and an esteemed correspondent sends us still another. With all the advertising it has had all over the world, you could pack every Esperantist on the globe into a single London borough. Destiny has decided this question; and, unless some cataclysm overwhelms the English-speaking world, the tongue it speaks must every day become more and more the language-link of the human race.

This is what has been said to Esperantists over and over again in France and Germany and Spain and Japan, if you replace the word English by French, or German, or Spanish, or Japanese.

There is one simple expedient which we would recommend to the editors of *The Future* in their desire to establish English as the World's Auxiliary Language. Let them write to all the foreign governments and request their co-operation. Then we shall see whether the claim for the universal adoption of English is considered a piece of audacious arrogance or not.

Esperantists are perhaps as yet a feeble folk. They may not at present number more than the population of a London suburb, but we remember that once you could pack the whole representatives of Christianity into a fishing boat.



# The Structure of Esperanto.

By HERBERT M. SCOTT, U.S.A.

(Conclusion.)

## THE CORRELATIVES.

The "Forty-five" are all built about a central root -I-, which, as in the infinitive, denotes "indefiniteness." Hence :

- IO (The noun ending) = "indefinite *thing*," something, anything.
- IA (The adjective ending) = "indefinite *kind* of," some, any (kind of).
- IE (The adverb ending, conveniently restricted to "place") = "indefinite *place*," somewhere, anywhere.
- IAL (Derivation uncertain: possibly a relic, with metathesis, of the Slavic *dla* (on account of)) = for some or any *reason*.
- IAM (The original form was -AN, modified in 1888 to -AM to avoid conflict with the accusative *ian*, *tian*, etc. The original ending is seen in Germ. *wann*, *dann*; Eng. *when*, *then*; Fr. *quand*; Span. *cuando*; Ital.-Latin *quando*) = at some or any *time*.
- IEL (An ending denoting "quality" or "manner," seen in Fr. *tel*, *quel*, *tellement*, from Latin *talis*, *qualis*) = in some or any *manner*, somehow.
- IES (The Teutonic ending of the possessive case, seen in Eng. *man's*, Germ. *mannes*, etc.) = *belonging to* some or anyone, someone's, anyone's.
- IOM (Cp. Eng. *some*, *how much*; Fr. *combien*: these forms are not etymologically related, but the Esp. -OM may be based on all of them) = some or any *quantity* or amount.
- IU (Probably a modification of -O, based on Eng. *who* (pronounced *hu*)) = some or any *individual*, someone, anyone.

Now adding letter-prefixes :

- ĈIO (The *C* is seen in Fr. *chaque*, Span. *cada*, "every," and *generalises* the indefinite series.) So *ĉio* means "everything," *ĉia* = "every (kind of)," etc.
- KIO (The *k* sound is found in Fr. *qui*, *quel*, *quoi*, *quand*, *comment*, *combien*; Span. *que*, *cual*, *cuando*, *como*, *cuyo*, *cuanto*, *quien*; Ital. *quale*, *quando*, *come*, *che*, *quanto*, *chi*; Rus. *kakoy*, *kogda*, *gdye*, *kak*, *kid*, *kto*—all *relative-interrogatives*.) Hence that is the function of *k* in the Esp. correlatives: *kio* = what, which; *kia* = what (kind of); etc.
- NENIO (Cp. Eng. *none*, *negative*; Fr. *ne*, *non*; Span. *ningun*, *nunca*; Ital. *non*, *ne*, *niente*; Germ. *nein*; Rus. *nye*.) So *nen-* *negatives* the indefinites: *nenio* = nothing, *nenia* = no (sort of), etc.
- TIO (Cp. the dentals in Eng. *this*, *that*, *there*, *then*, *thus*; Fr. *tel*, *tant*; Span. *tal*, *tanto*; Ital. *tale*, *tanto*; Germ. *das*, *darum*, *deshalb*, *dann*, *dort*; Rus. *takoy*, *togda*, *tam*, *tak*, *to*, *tot*.) So *t-* is prefixed to the indefinites to form the *demonstratives*: *tio* = that, *tia* = such a, etc.

The "generalising" particle *ajn* (used with interrogative-relatives) is probably formed with metathesis from Eng. *any* (cp. metathesis in *salajro* Fr. (*salaire*) from Latin *salarium* (Eng. *salary*)).

The "approximative" particle *ĉi* is the particle seen in Fr. *celui-ci*, *ci-dessous*, etc. The circumflex is added to distinguish from *ci*, meaning "thou."



## THE AFFIXES.

## PREFIXES.

Esp.	Eng.	Fr.	Span.	Ital.	Germ.	Rus.
bo-	..	<i>beau-père</i>	..	..	..	..
dis-	<i>disseminate</i>	<i>disseminer</i>	<i>disseminar</i>	<i>disseminare</i>	<i>Disposition</i>	..
ek-	<i>exclaim</i>	<i>s'écrier</i>	<i>exclamar</i>	<i>eccitare</i>	<i>explodieren</i>	..
ge-	..	..	..	..	<i>Geschwister</i>	..
mal-	<i>malcontent</i>	<i>malhonnête</i>	..	..	..	..
re-	<i>reunite</i>	<i>revenir</i>	<i>regresar</i>	<i>rivenire</i>	<i>reagieren</i>	..

## SUFFIXES.

-ad-	<i>cannonade</i>	<i>canonnade</i>	<i>propagación</i>	<i>continuazione</i>	<i>Kanonade</i>	..
-aj-	<i>package</i>	<i>laitage</i>	..	..	..	..
-an-	<i>American</i>	<i>américain</i>	<i>americano</i>	..	<i>Amerikaner</i>	<i>Varshavyanin</i>
-ar-	<i>library</i>	<i>librairie</i>	<i>dictionario</i>	<i>vocabulario</i>	<i>Vokabular</i>	<i>slovar</i>
-ĉj-	..	..	..	..	..	<i>Petya</i>
-ebl-	<i>lovable</i>	<i>croyable</i>	<i>creible</i>	<i>visibile</i>	..	..
-ec-	<i>goodness</i>	<i>mollesse</i>	..	<i>molezza</i>	..	..
-edz-	(This suffix was originally in the feminine form— <i>edzin</i> —, which is derived from Germ. <i>Kronprinzessin</i> .—ZAMENHOF.)					
-eg-	..	<i>cortège</i>	..	<i>corteggio</i>	..	..
-ej-	<i>bakery</i>	<i>tannerie</i>	<i>agencia</i>	<i>tipografia</i>	<i>Druckerei</i>	<i>Kuchnya</i>
	(This suffix is closely connected with -uj- below.)					
-em-	..	..	..	..	<i>arbeitsam</i>	..
	(Modified to prevent conflict with root <i>am</i> - ("love").)					
-er-	(Derivation doubtful: possibly a fragment of Germ. <i>Körnchen</i> as in <i>Sandkörnchen</i> (Esp. <i>sablero</i> ).)					
-estr-	(Probably from Ital.-Span. <i>maestro</i> (Fr. <i>maître</i> , Eng. <i>master</i> ).)					
-et-	<i>coronet</i>	<i>oiselet</i>	<i>pajarito</i>	<i>libretto</i>	<i>Libretto</i>	..
-id-	..	<i>Israelite</i>	<i>israelita</i>	..	<i>Israelit</i>	<i>Israelityanin</i>
	(Modified to distinguish from ending of past passive participle.)					
-ig-	..	..	..	..	<i>entschuldigen</i>	..
-ig-	(Probably a modification of -ig-.)					
-il-	<i>needle</i>	<i>utensil</i>	..	..	<i>Nadel</i>	..
-in-	..	<i>heroine</i>	<i>gallina</i>	..	<i>Königin</i>	..
-ind-	(Probably from Lat. <i>gerundives</i> in - <i>and</i> -, -(i) <i>end</i> -, modified as to the vowel by the influence of Fr. <i>digne</i> , Span. <i>digno</i> (Lat. <i>dignus</i> ), meaning "worthy".)					
-ing-	(Derivation doubtful: possibly from Germ. <i>eingang</i> (Esp. <i>enirejo</i> —"what something goes into").)					
-ist-	<i>dentist</i>	<i>modiste</i>	<i>Modista</i>	..	<i>Esperantist</i>	..
-nj-	..	..	..	..	<i>Gretchen</i>	<i>Sonya</i>
-uj-	<i>Turkey</i>	<i>Serbie</i>	<i>Italia</i>	..	<i>Türkei</i>	<i>Turtsiya</i>
	(Etymologically same as -ej- above, but vowel modified to distinguish from same.)					
-ul-	(Probably from Latin suffix - <i>ilis</i> , with vowel modified to distinguish from - <i>il</i> - above.)					
-um-	(The Latin neuter or neutral ending of the 2nd declension and many adverbs.)					

N.B.—The process of word-building by means of affixes, which in the natural languages is carried out in a very partial and haphazard fashion, is in International reduced to a scientific but practical system which reduces memory work to a marvellous extent (and incidentally stimulates the powers of thought).

\* \* \*

We have taken cursory stock of the grammatical framework of Esperanto. It is not necessary here to consider the International dictionary. Its roots are for the most part obviously taken from the natural languages on the basis of maximum internationality. Suffice it to say that the perpetual adequacy of the Esperanto vocabulary is assured by the two general principles (1) that compound words may be freely formed from any and all roots provided they make good sense, and (2) all words in the national languages that are or may become internationally prevalent are *per se* part of the Esperanto vocabulary.

In conclusion, we cannot but endorse the old slogan of propagandists: "*Simpla, fleksebla, belsona, vere internacia en siaj elementoj, la lingvo Esperanto prezentas al la mondo civilizita la sole veran solvon de lingvo internacia.*"



## Vera Dankeco!

## DRAMO EN KVAR AKTOJ.

AKTO 1A.—*La oficejo de S-ro Paŭl Peonio, fama florkulturisto. Je la leviĝo de la kurteno, S-ro P. P. sin trovas ĉe sia skribtablo, kalkulante siajn profitojn, kun feliĉa rideto ĉe la lipoj. Oni frapas ĉe la pordo.*

S-ro P. P. Eniru. (*Eniras Tom Tulipo, la ĉefĝardenisto de S-ro P. P.*)

S-ro P. P. Bonan tagon, Tom; kion vi deziras?

T. T. Bonan tagon, sinjoro. Mi jam laboradis por vi pli ol kvin jaroj, kaj . . .

S-ro P. P. . . . kaj pro tio, ke mi ĉiujare pligrandigis vian salajron, vi kredas, ke la tempo alvenis, kiam vi devas ricevi pluan pligrandiĝon, ĉu ne?

T. T. Tute ne, sinjoro, la nuna salajro tute kontentigas al mi.

S-ro P. P. "Miraklo inter mirakloj."

T. T. Eble, sed . . . mi deziras ekŝiĝi de la nuna laboro, ĉar mi havas la ambicion fariĝi florkulturisto, kaj posedi mian propran florbienon.

S-ro P. P. "Bona kaporalo revas esti generalo." Ĉu vi jam ĵetis la okulojn sur taŭgan bienon?

T. T. Jes, sinjoro; en la vilaĝo de Bonkaŝito, dek mejlojn malproksime de la stacidomo de Bonloko.

S-ro P. P. Ĉu vi restus ĉe mi por duobligita salajro?

T. T. Mi tre ŝatus fariĝi florkulturisto, por mi mem.

S-ro P. P. "Kiu ne riskas, tiu ne gajnas" . . . do, "bone sukcesu, sed min ne forgesu."

AKTO 2A.—*La sama sceno post du jaroj. S-ro Peonio ankoraŭ faras kalkulojn, sed lia rideto aspektas ĉe pli feliĉa ol antaŭe. Oni frapas.*

S-ro P. P. Eniru. (*Eniras S-rino Tulipo. Ili salutas unu la alian reciproke.*)

S-ro P. P. Kio dolorigis vin?

S-rino T. Aŭskultu al mia dolorplena rakonto, sinjoro.

S-ro P. P. Plezurege, sinjorino . . . pardonu min; mi intencis diri, mi aŭskultos pacience.

S-rino T. Mi devas priparoli la edzon; mi timas ke li perdis sian . . .

S-ro P. P. . . . vivon?

S-rino T. Ne vivon, sinjoro; la afero estas multe pli grava ol tio; mi timas, ke li perdis sian monon.

S-ro P. P. "Malpli da mono, malpli da zorgo."

S-rino T. Ne, sinjoro; "ne ekzistas domo, se ne ekzistas mono."

S-ro P. P. Konsentite. Por malplilongigi la rakonton, mi devas konfesi, ke mi jam divenis vian aferon. La florkultura entrepreno malbone sukcesis, ĉu ne?

S-rino T. Ĝi tute malsukcesis.

S-ro P. P. "Bona servisto ne ĉiam fariĝas bona firmestro."

S-rino T. Tute ne, sinjoro.

S-ro P. P. Diru al la edzo, ke li venu ĉi tien morgaŭ matene, je la roa, kaj kunportu kun si, ĉiujn dokumentojn rilate al la bieno, kaj mi faros mian eblon por lin helpi.

S-rino T. Ho, kiel bona vi estas; kiamaniere mi povos danki al vi?

S-ro P. P. Ne penu; ĝis la revido.

AKTO 3A.—*Pasis unu tago. La sama sceno. S-ro Peonio sidas ĉe la skribtablo, sed la feliĉa rideto nun kovras la tutan vizaĝon. Oni frapas.*

S-ro P. P. Eniru. (*Eniras Tom Tulipo, portante amason da paperoj. Ili faras la kutimajn salutojn.*)

S-ro P. P. Via entrepreno ne havis grandan sukceson, ĉu?

T. T. Mi jam perdis preskaŭ naŭcent funtojn.

S-ro P. P. "Pli bone honoro, ol multe da oro."

T. T. Mi gajnis nek honoron, nek oron.



S-ro P. P. Ni vidos. Pasigu al mi la paperojn. (S-ro P. P. tralegas la dokumentojn.)

S-ro P. P. Mi aĉetos vian bienon por naŭcent funtoj, kondiĉe ke vi tuj rekomencu labori por mi, por salajro duobla de la antaŭa.

T. T. Vi estas tro malavara, sinjoro.

S-ro P. P. Mi povas vidi pli malproksime ol la pinto de la nazo; mi gajnos pli ol tio per via laboro.

T. T. Mi ne sukcesis fari tion por mi mem.

S-ro P. P. Sed kial?

T. T. Mi certe ŝatus scii.

S-ro P. P. Vi malsukcesis pro tio, ke vi akiris bienon dek mejlojn malproksime de stacidomo, forgesinte, ke post la kreskado venas la vendado.

T. T. Jes, sinjoro, tion mi forgesis.

AKTO 4A.—*Pasis unu jaro. Ankoraŭ la sama sceno, la samaj kalkuloj, la sama rideto, sed iom pli granda kaj pli feliĉa ol iam antaŭe. Oni*

*frapas. Eniras Tom Tulipo, la du viroj salutas unu la alian.*

S-ro P. P. Kion vi deziras, Tom?

T. T. Preskaŭ mankas al mi la kuraĝo klarigi la aferon, sed . . .

S-ro P. P. Ho, mi komprenas; la nuna kosto de nutraĵoj, k.t.p., estas tiel peza, ke vi bezonas pli grandigon de la salajro, ĉu ne?

T. T. Ne, sinjoro; la salajro de vi pagita estas multe pli granda ol mi meritas, kaj . . .

S-ro P. P. . . . kaj vi venas por peti, ke mi malpligrandigu ĝin?

T. T. Ne, sinjoro; sed denove mi deziras fariĝi . . .

S-ro P. P. . . . bankrotulo?

T. T. Mi zorgos kontraŭ tio.

S-ro P. P. Vere?

T. T. Jes, sinjoro, ĉar mi ne forgesis la bonan konsilon, kiun vi faris al mi antaŭ unu jaro, kaj mi jam akiris taŭgan bienon tute proksime de la stacidomo de Bonloko. Ĝis la revido, sinjoro.

S-ro P. P. Aĉ! eĉ! iĉ! oĉ! uĉ!

KURTENO.

## Komercaj Leteroj.

Sekvo de LA INTERNACIA EKSPERIMENTO.

GENTLEMEN,—We beg to offer you 50 packs Merino Tops, dry-combed as per sample herewith marked M.T. at 6s. 3d. per lb. Terms: F.O.B. Hull, cash in 30 days, less 2 per cent. The price quoted is based on the rate of Exchange at 27.20 francs to the £ sterling. Any difference in the rate of Exchange at the time of payment to be either debited or credited to you.

Assuring you of our best attention to your order,

We are,

Yours sincerely,

MILAN.

GENTLEMEN,—We received your name from the Italian Chamber of Commerce, and in this letter we are asking whether we can represent your firm in Italy.

ESTIMATAJ SINJOROJ,—Ni permesas al ni proponi at vi 12,000 funtojn anglajn da kombita lano el merino, senolea, laŭ specimeno ĉi-kune markita M.T. po ses ŝilingoj kaj tri pencoj por funto. Kondiĉoj: Senkoste surŝipe en Hull: pago post 30 tagoj, deprenante rebaton de 2 procento. La prezo montrita baziĝas sur kurzo je 27.20 frankoj po funto sterlinga. La vario de tiu kurzo je la pagtempo estos aŭ debitata aŭ kreditata al vi.

Certigante vin pri nia plej bona atento al viaj mendoj,

Ni restas,

Tre sincere la viaj,

MILANO.

SINJOROJ,—Ni ricevis vian nomon de la Komerĉa Ĉambro de Italujo, kaj en ĉi tiu letero ni demandas, ĉu ni povos reprezenti vian firmon en Italujo.



Our firm was for many years in the shoe trade, and now that the war is over, we are doing our best to recommence our business relations with the British Nation. If you are interested in this regard, we will put your firm in relation with the best customers in Italy, and at the beginning of the year we shall come to England and visit you, to give you full information with regard to our proposal.

Awaiting the pleasure of your kind reply,—We remain, Sir,

Yours very faithfully,

THE . . . BANK, CHRISTIANIA.

DEAR SIRs,—We beg to acknowledge your letter of the — date requesting us to enter bail for the ss. — now lying at Hull, in respect of the claim now made against the vessel by the owners of the ss. — *re* the collision in the River Humber.

We find the bail demanded is £2000, and we will give the matter our prompt attention so that the vessel may be released without loss of time.

Our charges will be at the usual rate of — per cent. plus any Court fees and other expenses,—Yours, etc.

THE . . . BANK, LYONS.

DEAR SIRs,—We have been requested by an influential client to obtain for him the names of a few leading firms in Lyons who manufacture silk dress goods suitable for the English trade, and shall be much obliged if you will supply us with the names of, say, six firms of good reputation who do an export trade.

The stoppage of supplies during the war has resulted in depleted stocks here, and our client would like to get in communication with firms who are in a position to make prompt delivery of goods.

Assuring you of our services at all times,—Yours, etc.

Nia firmo estis dum multaj jaroj en la ŝu-komercio, kaj nun kiam la milito estas fininta, ni faras nian eblon rekomenci niajn komercajn interrilatojn kun la Brita nacio. Se vi interesiĝas pri tio, ni kunrilatigos vian firmon kun la plej bona klientaro en Italujo, kaj je la komenco de la jaro ni venos al Anglujo kaj vizitos vin por doni al vi plenan informon pri nia propono.

Atendante la plezuron de via afabla respondo, ni restas, Sinjoroj,

Via tre fidele,

Ni plezure konfirmas la ricevon de via estimata letero de la —, kiu instruas nin kaŭcii por la Vaporŝipo —, kiu sin trovas nuntempe ĉe Hull, koncerne la pretendojn kontraŭ ĝi de la posedantoj de Vaporŝipo — rilate al la kolizio en rivero Humber.

Ni sciiĝis, ke la kaŭcia-mono postulita estas £2000 kaj ni tuj atentis la aferon tiel, ke la ŝipo povos esti ellasita sen perdo de tempo.

Niaj kostoj estos laŭ la kutima tarifo de — pro cento, kaj aldonota estos ĉiuj juĝejaj pagoj kaj aliaj elspezoj.—Viaj, k.t.p.

LA BANKO . . . , LYONS.


Unu el niaj influaj klientoj petis nin konigi al li la nomojn de kelkaj el la ĉefaj firmoj en Lyons, kiuj fabrikas el silko, vestaĵajn materialojn taŭgajn por la angla komercado.

Estus tre kompleze, se vi havigus al ni kelkajn nomojn, eble ses, de firmoj, kiuj ĝuas bonajn reputaciojn kaj kiuj komercas eksterlande.

Sekve de nericevo de sendaĵoj dum la milito, la provizoj ĉi tieaj estas eksterordinare malgrandaj, kaj nia kliento volonte ekrilatigis kun firmoj al kiuj estas ebla senprokrasta ekspedo de komercaĵoj.

Certigante vin, ke niaj servoj estas ĉiam je via dispono,—Viaj, k.t.p.





## Competition for Boys and Girls.

Conducted by Miss JANE BAIRD.

This Competition is limited to boys and girls of not more than 15 years of age. Competitors must write their solutions on a postcard addressed "KONKURSO," c/o Miss JANE BAIRD, 95 Bellevue Road, Edinburgh, and add their age and the name of their school. A Monthly Prize will be given, and at the end of the Competition special prizes will be awarded to those who obtain the highest total number of marks.

*N.B.*—It must be understood that Solutions are the competitors' unaided work.

In schools where Esperanto is taught it is suggested that the teacher collect the cards and send them in under an envelope, to save postage.

### TENTH COMPETITION.

*Postcards to be sent not later than 4th November.*

(This is the Final Competition of the Series.)

### Kunigoj.

*By the combination of two or more roots obtain a new root.*

*Ex. Kunigu floran kaj kanton, kaj vi ricevos ŝnurligitajn globetojn (rozarion):—*

1. Kunigu akvuojn kaj mineralaĵon, kaj vi ricevos beston.
2. Kunigu ludilon kaj instrumenton, kaj vi ricevos parton de la okulo.
3. Kunigu malpuraĵon kaj ujon, kaj vi ricevos birdon.
4. Kunigu metalon kaj numeron, kaj vi ricevos parton de ŝipo.
5. Kunigu malsanon kaj mineralaĵon, kaj vi ricevos komplezon.
6. Kunigu mineralaĵon kaj pronomon, kaj vi ricevos vegetaĵon.
7. Kunigu mineralaĵon kaj prepozicion, kaj vi ricevos parton de la korpo.
8. Kunigu duon kaj kunligilon, kaj vi ricevos parton de ĉapitro.
9. Kunigu sukeraĵon kaj prepozicion, kaj vi ricevos lumigilon.
10. Kunigu numeron kaj temp-periodon, kaj vi ricevos veturilon.

## Result of Eighth Competition.

The highest number of marks in this competition has been gained by :

MURIEL SEVERN (age 10),  
St John's College,  
Worcester.

*Honours List* (24 marks).—Katharine Osmond, *N. London Collegiate School.*

*Hon. Mention* (17 marks).—Jas. Ashurst, Harry Ashworth, Ernest Beardshaw, Harold Burns, Cyril Carter, Alfred Chappell, Geo. Crawshaw, Arthur Dean, Sydney Duncan, Fred Evans, Norman Finlow, John Fletcher, Alfred Grayson, Hilda Hesketh, H. Higginbotham, Ernest Humphries, T. Hunter, Clifford Johnson, John Jones, Horace Kenyon, Dennis Kirwin, Charles Shadbolt, Walter Smith, Harold Smith, Arthur Lunor, Arthur Smith, Alex. Smith, L. Walker, Mark Weston, Claude Watkins, Frank Ward, *Green Lane C.C. School, Patricroft.*

*Commended* (16 marks and under).—Katharine Langley, *Lady Manners School, Bakewell, Buxton*; James Finlay, *Donaldson's Hospital, Edinburgh*; Cyril Brown, S. Brown, Florence Barratt, Edith Barnes, Harry Crompton, Fred Duesbury, Smith Dugmore, Marjorie Dyson, James Floyd, John Fleming, J. Fawcett, Edith Gardner, F. Hesketh, John Hannahan, James Holland, Frank Harvey, Arthur Harris, John Holland, Ernest Holt, Ella Holden, Bertha Hewitt, Frank Jackson, William Kershaw, Thos. Kennedy, Clara Kelly, Thomas Lea, Ernest Lees, James Lamb, Wilfred Manley, Fred Monks, Doris M'Clelland, Winnie Mellor, Lilian Moss, Godfrey Nelson, Daisy Owen, Marcus Ogden, William Parker, Frank Pearson, G. Peters, John Stone, J. Stanbrook, Elsie Sheriff, Edward Sillence, B. Savigny, John Thomason, Charles Trott, Arthur Wood, Kenneth Wilson, Eliz. Watts, *Green Lane C.C. School, Patricroft.*

\* \* \*

### SOLUTIONS.

(Eighth Competition, p. 92.)

(a) Proverboj kaj sentencoj:—

(1) Fino bona, ĉio bona. (2) Barelo malplena sonas plej laŭte. (3) Por saĝulo sufiĉas aludo. (4) Homo proponas, sed Dio disponas. (5) Ne ĉio brilanta estas diamanto. (6) Komenco bona—laboro duona.

(b) Ujoj!—(1) sak, (2) botel, (3) barel, (4) skatol, (5) valiz.

**GRAVA ANONCO.**—Pro la pligrandigo de la preskosto da la gazetoj, la Konsilantaro de la B.E.A. decidiĝis kombini la BRITISH ESPERANTIST kaj THE ESPERANTO MONTHLY de post la fino de 1919. S-ro Millidge kaj S-ro Page estos kunredaktoroj, kaj oni povas atendi, ke en iliaj manoj ne mankos al la estonta gazeto sufiĉe da interesaĵoj.



## El la Proksima Oriento.

Here is a beautifully printed booklet which gives an example of how Esperanto can be utilised to inform the greater world about the lesser nationalities. The author, Ivan H. Krestanov, whose style is clear, and matter interesting, is unfortunately an "ioulo," which detracts from the value of his work from the standpoint of the *vera Esperantisto*. The book contains informative description of the peoples and literatures of Ukrainia, Lithuania, White Ruthenia, Lettonia, Esthonia, Finland, Georgia and the Tartars. Finally there is an ethnographic map of Old Russia with names in "Esperanto."

*El la Proksima Oriento*, by Ivan H. Krestanov. 68 pgs., kun etnografia karto. Bulgara Esperanto-Biblioteko, serio ii., n-ro. 2. Prezo, 2.50 fr.

\* \* \*

The B.E.A. has published a new 8-page pamphlet, "Esperanto in the School" (price one halfpenny, 3s. 6d. per 100), bringing up to date the information as to the teaching of Esperanto in British schools.

## U E A

## Universala Esperanto Asocio

Every Esperantist should become a member of the U.E.A. and subscribe to its official organ "ESPERANTO."

The Annual Subscription to the Association is 2s., and to the Gazette 5s.

*Delegates of the U.E.A. throughout the world*

Central Office

14 MUSEUMSTRASSE, BERNE, SVISUJO

## DUTTON'S 24 HOUR

DUTTON'S Shorthand has only six rules and twenty-nine characters. Complete theory learned in twenty-four hours. That stage reached, practice quickly gives high reporting speeds. Send two stamps for specimen lesson to Dutton's College (Desk D. 62), Skegness.

## SHORTHAND

We note with pleasure the increased amount of notice of Esperanto which is being taken by commercial publications. The commercial and industrial magazine *Portugal*, the first number of which has come to hand, contains an Esperanto section under the direction of our esteemed correspondent, Saldanho Carriera. The magazine, which is beautifully printed and illustrated, is published at Travessa de S. Marçal, 44 Lisboa, Portugal.

\* \* \*

In the course of an article on "The Berlin to Bagdad Line" in *Scribner* for July, Mr John H. Finley, Red Cross Commissioner for Palestine, writes: "Let the Red Cross spirit persuade a world order in which there shall be . . . a world order language to be everyman's second language—call it everyman's language—language of the world league."

## THE BEST FOR ALL LANGUAGES

**Gregg EASY** To LEARN  
Shorthand To WRITE  
To READ

All characters light, no thickening. Vowels inserted in natural order. This makes reading as sure as longhand.

Esperanto adaptation, price 1/6  
post free 1/7½

*Particulars and Copy of Magazine free*

THE GREGG PUBLISHING COMPANY  
21 HARRINGTON STREET, LIVERPOOL

## THE ESPERANTO MONTHLY

Subscription—2/6 per annum, post free

SUBSCRIPTIONS and all BUSINESS COMMUNICATIONS should be addressed to *The British Esperanto Association*, 17 Hart Street, London, W.C.1

EDITORIAL MATTER should be sent to S-ro W. M. PAGE, 218 Bruntsfield Place, Edinburgh.



# SELECT LIST OF ESPERANTO BOOKS

OBTAINABLE FROM  
**THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Incorporated)**  
 17 HART STREET, LONDON, W.C.1

## FUNDAMENTA KRESTOMATIO

Edited by Dr ZAMENHOF

Prose and Verse Selections  
 The Standard Guide for Esperanto Style

460 pages

Paper, 4s. Bound, 5s. 6d. Postage, 6d. extra

## SOME ORIGINAL WORKS IN ESPERANTO

MIRINDA AMO. By H. A. LUYKEN  
 Paper, 2s. 6d. Bound, 3s. 6d.

NOVA SENTO. By TAGULO 1s. 6d.

TRAVIVAJO DE RO ŜO.  
 By RICHARD SHARPE 1s. 6d.

LILIO. By E. ALLEYNE SINOTTE  
 Bound, 2s. 6d.

Postage extra

## THE ESPERANTO MANUAL

By MARGARET L. JONES

Fifth Edition. 1s. 6d. net, 1s. 8d. post free

## THE ESPERANTO TEACHER

By HELEN FRYER

Ninth Edition. 1s. net, 1s. 2d. post free

Second Edition THE Revised

## 'EDINBURGH' ESPERANTO POCKET DICTIONARY

206 pages. 18,000 words

"A really useful, convenient, and presentable volume."—*British Esperantist*.

Leather, 2s. 7d. post free; Cloth, 1s. 7d. post free

## SHAKESPEARE IN ESPERANTO

HAMLET (Dr ZAMENHOF). Paper, 2s.

MAKBETO (LAMBERT). Cloth, 2s.

LA VENTEGO (MOTTEAU). Cloth,  
 2s. 2d.

LA VENECIA KOMERCISTO  
 (WACKRILL). Paper, 1s. 6d.

## THE BIBLE IN ESPERANTO

NEW TESTAMENT, complete

(Published by British & Foreign Bible Society)

White Paper, Art Cloth, 2s. 3d.; French

Morocco, 4s.; Persian Yapp, 10s.;

India Paper, French Morocco, 5s.;

Persian Yapp, 12s.; postage 3d. extra

## OLD TESTAMENT

Dr ZAMENHOF's Translations

Genesis, Exodus, Leviticus, Numbers,  
 Deuteronomy, 2s. each; the Psalms,  
 2s. 6d.; Proverbs, 1s. 6d.; Ecclesiastes, 9d.

By BERNARD LONG, B.A.

## ESPERANTO AND WHY WE NEED IT

30 pp. Price 2d.

Two Shillings a dozen post free

"A convincing booklet"

## INDISPENSABLE BOOKS FOR ADVANCED STUDENTS

GRAMMAR AND COMMENTARY

Compiled by

Maj.-Gen. GEORGE COX, B.A. (Cantab.)

Third Edition. 3s. 3d. post free

ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY

By EDWARD A. MILLIDGE

Third Edition. 7s. 9d. post free

ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY

By JOSEPH RHODES, F.J.I.

Post free, 5s. 5d.